# RATKAPTISTA KURIERO

## INFORMILO DE LA RATKAPTISTA BANDO

NUMERO 25 DECEMBRO 2000


## TERMINE 2001

(1. Halbjahr)

freitags in der Sumpfblume
ab **19.00 Uhr** Kurs – ab ca. 20.00 Uhr Programm

| | | |
|---|---|---|
| 12.1. + 26.1. | | 9.2. + 23.2. |
| 9.3. + 23.3. | 20.4. | 4.5. + 18.5. |
| 1.6. + 15.6. + 29.6. | | 13.7.2001 |

## Einladung zur Jahreshauptversammlung

am: **12. Janurar 2001** ab 20.00 Uhr
(vorher ab 19.00 Uhr Kurs)
in der Sumpfblume, Hameln
TOP's: Begrüßung, Jahresbericht, Kassenbericht, Vorstandswahlen, Planungen 2001, Verschiedenes.

## Malgranda raporto pri aktivecoj en 2000:

En la jaro 2000 ni renkontiĝis 23-foje: 17-foje en la „Sumpfblume", 3-foje private (ĉe Lore, Christiane, Heinz). 1-foje ni kune vizitis la BARon en Bad Münder, kie ni en internacia rondo kuiris, manĝis kaj multe ludis, 1-foje la Esp.-grupon en Hildesheim, kie ni renkontiĝis rusan familion ĉe la gastigantino Dorothee, 1-foje la Esp.-grupon en Detmold, kie ni ĝuis promenadon tra la urbo kaj kastela parko, viziton de la landa muzeo kaj babiladojn en kafejo kaj en la „Esperanto-Cantina No 1". Unuopuloj ankaŭ vizitis aliajn renkontiĝojn en Hildesheim, Herzberg, Bad Münder, ktp. Dum la grupvesperoj ni legis en „Tesi, la testudo" kaj komencis per nova lernolibro laŭ Schiffer-metodo. Ni aŭskultis kelkajn kantojn, ekz. „La granda kermeso" + „La parko" de „kajto" kaj „IS" de „Amplifiki". Ni ludis „6 nimmt", Memory" + „Helferspiel" kaj voĉlegis kelkajn leterojn kaj tekstojn. Plie ni aŭskultis vojaĝraportojn pri Tunizio, la Garda Lago kaj la EXPO, esploris la surfadon en la interreto kaj ĝuis antaŭkristnaskan vesperon. Post jam de ni planitaj programeroj bedaŭrinde la ĉi-jara domgrupoj-festo estis ŝancelita. Sed ĉe organizita informvespero ni povis saluti kelkajn interesitojn, eĉ el fora regiono Dassel . Kiel novuloj venis al nia grupo: Klaus, Monika, Mareike, Katharina, Katharina, Susanne kaj Johannes. „Koran bonvenon!" Bedaŭrinde ni ankaŭ devas adiaŭi iun: Gita, kiu translokiĝos al Bielefeld. Ni tie deziras al ŝi ĉion bonan kaj sukcesan plilernadon en la tiea Esp.-grupo.

promenado tra la kastela parko

antaŭ la "Esperanto"

### Renkontiĝoj en 2001

20.-27.1. Slowakei + 17-24.2. Norwegen: Int.Skiwochen;
17.3. REVO Wörlitzer Parktreffen in Wörlitz;
9.-16.4. PSI, Int.Frühlings-Woche in St.Andreasberg;
11.-17.4. IJF Int. Jugend-Festival in Italien;
20.-22.4. JER Jugend-Esp.-Treffen in Ungarn;
1.-4.6. Deutscher Esp.-Kongress in Ludwigshafen;
1.-4.6. Esperanto-Volkstanz auf Burg Klemperow (MV);
15.-28.7. Fahrradkaravanen nach Strassbourg;
21.-28.7. 86. Weltkongress in Zagreb;
29.7.-5.8. 57. Jugendweltkongress in Strassbourg;
20.-26.9. KISO in Marburg;
Frühling + Herbst BARO in Bad Münder; etc. ... ...
**vollständiger Kalender:** www.esperanto.hu

### A,a,a, nun vintro estas ja

1) A,a,a, nun vintro estas ja. Pasis for somer', aŭtuno, brilas nun la vintra suno. A,a,a, nun vintro estas ja.
2) E,e,e, glacio, neĝ', ho ve! Sur fenestroj vitroj floras, floroj, kiuj ne odoras. E,e,e, glacio, neĝ', ho ve!
3) I,i,i, vi helpu multe pli al la homoj kun suferoj, sen manĝaĵoj, en mizero. I,i,i, vi helpu multe pli.
4) O,o,o, mi ege ĝojas, ho, pri kristnaska festdonaco kaj ĉiama, vera paco. O,o,o, mi ege ĝojas, ho!
5) U,u,u, en vintro estas ĝu': gliti, sledi kaj skiadi, danci, ludi kaj festadi. U,u,u, en vintro estas ĝu'.